

LA VERDA LUPEO – FENIKSO



Nr-o 75 **1988/ 2 Septembro** **20a jaro**

Informilo de Esperanto Ligo Filatelista
– Faka asocio en UEA –













































Informilo de ELF-AREK (Faka asocio en UEA)
Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidanto/Kasisto:	Ivar Paulsson, Skytteholmsvägen 29, S-171 44 Solna
Stampobanko:	Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau
UEA-konto:	elfx/r
Poŝtkonto:	51 57 85-4, I. Paulsson, Solna, Svedujo
Kotizo por 1988:	15 respondkuponoj aú 15.– gmk aú egalvaloro

Redaktoraj vortoj . . .

Finfine alvenis hodiaú, (12.8.88) la kongreskunvena protokolo, mi do envicigas ĝin en la manuskripton kun la novaĵo pri la E-pm katalogo pri kiu hieraú mi eksciis. Hodiaú vi tenas en viaj manoj jubilean numeron de nia modesta bulteno. La 75an! Envicigi ĉiujn informojn ricevitajn denove ne eblas, feliĉe (!), ĉar tiel jam ekzistas bona fundamento por la sekva numero kiu aperos fine de decembro. Dudeko da niaj klubaj geamikoj bone kunlaboras per informoj. Sed la plej granda parto de niaj klubanoj silente akceptas nian informilon. Tio ne plaĉas al mi. Nia informilo povus aspekti multe pli informriĉa. Jen ekzemplo: tutan monaton post la apero de la nuna jugoslava pm federacigermano informis min, kun kopioj! El Jugoslavio nenion mi aúdis. Se la membroj ne informas la redaktoron pri novaĵoj, tiam nia informilo ne povas peri al la membroj sciigojn pri tio.

Kun la hodiaúa informilo aperas la jam 5a suplemento por nia stampokatalogo de 1983. Certe, baldaú devus aperi nova stampokatalogo. Sed tio estas terura laboro, kiun momente mi ne emas komenci. Se vi legas en tiu suplemento pri pm n-ro 84: ne aperis 84 E-pm, sed 57 kun 27 iuj variaĵoj (aú pli!). Tiu listo en nia katalogo estas absolute provizore farita, nur por peri al niaj membroj scion pri aperintaĵoj. Al tiuj, kiuj kontribuis al tiu ĉi informilo, mi direktas koran dankon. Al tiuj, kiuj ne kontribuis, mi apelacias pri kunlaboro.

Salutas vin ĉiujn via redaktoro
Rudolf Burmeister, W.-Firl-Str. 30, Karl-Marx-Stadt, DDR-9047

Jubilea numero de FENIKSO/LA VERDA LUPEO

Tiu ĉi informilo estas la 75a. La unua aperis 1.10.1968, redaktita de nia karmemora Reinhold Jensen. Li sukcesis aperigi 20 numerojn ĝis sia morto la 20an de aprilo 1972. D-ro Antonio de Salvo daúrigis la redaktadon de la FENIKSO ĝis numero 33. Ekde la 1a de januaro 1977 mi estas la redaktoro de tiu ĉi informilo, kiu de tiam portas la nomon LA VERDA LUPEO/FENIKSO. Do, la 1an de oktobro 1988 ni festos la 20-an naskiĝtagon de nia informilo. Ke ĝi ankoraú ekzistas, ni ŝuldas al nia prezidanto Ivar Paulsson, al lia amiko (kaj nia) Kurt Lindström, kiuj ĉiujare finance savis nian ekziston. Sed ankaú vico da klubaj geamikoj finance tre subtenis nin, inter ili nia forpasinta Zdenek Stifter.

Antaú 20 jaroj fondiĝis ankaú nia "Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj" post la PRAGA 68 kun 17 membroj. Paulsson fariĝis nia prezidanto, kaj Heimlich nia vicprezidanto. Tiel restis ĝis nun. Aútune 1975 AREK geedziĝis kun ELF, kiu ekzistis ekde la 3a de majo 1964 sub la gvido de Herman Heiss.

Anoncoj

Ĉinio

Zhu Bao Long, 41 Huan cheng Xi Lu, Hangzhou, 310006 China, dez. interŝanĝi E-fil.

Li Xiaohong, Bing Tuan Nong Jinshi Zhong Xue, Emin. Xinjiang, China, 29-jara instruistino, dez. ricevi ĉiuspecajn esperantaĵojn.

Pollando

Roman Kubczyk, P.O.Box 449, PL-42-217 Czestochowa, sendas reko-markon Gdynia 21-Zamenhofa kontraŭ alilandaj stampoj.

Novaj membroj

S-ino M. Groen-Groot, Sybrandsplein 5, N.G. 1601 Enkhuizen, Nederlando kol. glm, sta kaj e-ajojn.

Giacomino Martinez, Viale Venecia 396/3, I-33100 Udine.

Gratulon al

Richard Hirsch en FRG pro akirita ora medalo en la pm-ekspo COPHILA 88 por sia erinofilia ekspozaĵo pri E.

Leo Vulfoviĉ en Moskvo por prezentado de ekpozaĵo 100 jaroj E en moskva filatela ekspozicio.

KORALO pro daŭra aktiva e-filatela agado en Ĉinio, i.a. en Changsha.

S-ro Pesti en Szeged pro sukcesa e-filatela ekspozicio en Szeged 1988.

Stefano Fekete en Budapest, pro daŭra filatela agado en Hungario.

Aperis E-pm katalogo

Nia kluba amiko Song Shengtan kompilis tiun katalogon, kiu aperis en julio 1988 en la ĈINA ESPERANTO ELDONEJO. En ĝi ni trovas detalajn informojn pri ĉiuj ĝis fine de 1987 aperintaj E-pm.

La informoj estas vicigitaj laŭ la jena skemo:

- E-temaj pm
- Tutaĵoj kun E-temaj enpresitaj pm
- Pm kun E-temaj talonoj
- Suplemento kun jubilejaraj E-filatelaĵoj
- Registro

En la antaŭparolo la kompilinto diras, ke tiu libreto estas frukto de la internacia kunlaboro de E-filatelistoj, kaj li esprimas sian dankon al tuta vico de niaj klubaj geamikoj.

La katalogo estas presita sur luksa brila papero. Koloraj bildoj akompanas ĉiun pozicion. La katalogo prezentiĝas kiel luksa primovada eldonaĵo kaj mi nepre volas rekomendi, montri ĝin la literatura klaso de iu el la sekvontaj tutmondaj pm-ekspozicioj.

Ni kore dankas al nia amiko Song pro tiu ĝis nun en nia filatela medio unike bela kaj bona katalogo.

Nian koran dankon kaj gratulon ni same direktas al sinjoro Laúlum de la ĉina Esperanto Eldonejo, kiu donis sian helpon por la katalogo.

Burmeister

Aldono: Pri la apero de la katalogo mi eksciis la 11-an de augusto 88, ĉar Ĉina Esperanto Eldonejo sendis al mi ekzempleron. Dankon al ili!

ELF-AREK kunvenis en la 73a UK

Pli ol 60 kolektantoj el 20 landoj, inter ili 25 niaj klubaj geamikoj, partoprenis tiun kunvenon okazintan la 28an de julio 1988. Gvidis ĝin nia Lech Kosieniak kaj malfermis ĝin nia prezidanto Ivar Paulsson. Oni aúdis informojn pri lastatempaj E-filatelaj novaĵoj, kiujn donis i.a. Hirsch, Goslinga, Koĉvara, Božic, Kosieniak, Mingyi kaj Paulsson. En la dua parto de la kunveno okazis amika interŝanĝo de diversaj E-aĵoj.
(El la protokolo sendita de Kosieniak, ricevita 12.8.) Dankon al vi! Pardonu, ke mi ege mallongigis ĝin.

La ĵaro 1987 – Filatela statistiko

En 21 landoĵ aperis entute 133 E-filatelaĵoĵ. (Aústrio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Francio, GDR, GFR, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kubo, Malto, Meksikio, Nederlando, Pollando, Svedio, Sovetunio, Surinamo)
Poŝtaĵ ŝtampoĵ (inkl de 12 var): 104
Poŝtmarkoĵ (inkl de 3 surpresitaĵ sur tutaĵoĵ): 12
Tutaĵoĵ (surpresitaĵ pk kaĵ kov): 17
Rekordan lokon okupas Ĉinio kun 60 stampoĵ (inkl de 9 variaĵoĵ), uzitaĵ en 55 urboĵ.
Por la Ĉinio E-pm aperis proks. 20 div. poŝtaj unuatagaĵ kovertoĵ, kun tiuĵ de BU, KU, MAL, PO kaĵ MEK do entute aperis 25 UTK.

Niaj poŝtmarkoj

Jubilea pm en Jugoslavio

Hans Jankowski, nia kluba amiko el FRG, sendis al mi informojn pri ĝi. En la UK Rotterdam li renkontis jugoslavon, kiu ofertis la pm, utk kaj faksimilojn. Jen do la detaloj:
Tago de la eldono: 14.07.1988 kun nelimigita valido
Formato de la marko: 30x37, de la bildo 26x33
Kombila dentumo: 13 1/4
Koloroj: blua kun verda stelo. Marĝeno: olive verda
Nominalo: 600 dinaroj
1 folio posedas 8 pm kun meza talono kun Zamenhofa portreto
Grafika aranĝo: akademia pentristo Dimitrije Ĉudov
Presita en la monbileta presejo Beograd
Prestekniko: dukolora ofseto
Eldonkvanto: ne publikigita

Lige kun la marko aperis utk, memoriga koverto kaj unuataga stampo. La pm posedas la saman motivon, kiel tiu aperinta pm en la jaro 1953 por la uk en Zagreb (terglobo, naciaj flagoj kaj verda stelo). Supre la teksto: STO GODINA ESPERANTA (CENT JAROJ ESPERANTO). Sube la cifero 600 kaj JUGOSLAVIJA.

Dankon al Jankowski pro la senditaj kopioj.

PRAGA 88 denove kun E-pm

Nia Dolfa Bartoŝik sciigis, ke okaze de la PRAGA la CS-poŝto emisiis en la unua de julio 1988 dupecan serion da porokazaj poŝtmarkoj kun nominaloj de unu kaj de du kronoj. Po du el ili troviĝas sur nedentumita folio. Sur la 2-krona pm estas bildo pri la malsanulejo FAKULTA. Dekstre de la marko estas talono kun simbolo de la PRAGA 88 kaj kvarlingva teksto en la slovaka, ĉina, japana kaj en Esperanto: TUTMONDA EKSPOZICIO DE POŜTMARKOJ. Eblas, kombini la talonon kun la unukrona pm, tiúkaze la troviĝus maldekstre de la unukrona pm. Kaj finfine ne eksterordinara estus la kombino: 2-krona pm /talono/ 1-krona pm. Bildon pri la folieto aperigis verŝajne ĉiuj en la mondo ekzistantaj filatelaj gazetoj. Gratulon al ĈEA kaj dankon al nia Dolfa Bartoŝik!

BU–UTK por la jubilea pm

Strange, sed vere: pli ol jaron post la eldono de la jubilea E-pm la bulgara poŝto postliveris "unuatagan" koverton por ĝi. Havebla ĝi estis nur en tre malgranda kvanto en la filatelaj magazenoj. Nur pene mi povas min reteni, skribi mian opinion pri tiu ĉi afero. Koran dankon al Cankova kaj Hlebarov pro la informoj!

Niaj poŝtstampoj

JU 37

Unuataga memoriga stampo akompanis la aperon de jugoslava jubilea E-pm. La stampo posedas sube la daton 14.7.1988. Meze troviĝas Zamenhofa portreto, super ĝi la teksto: LUDWIK LAZAR ZAMENHOF, sub ĝi: 100 GODINA ESPERANTA. Supre: PRVI DAN (= unua tago) kaj: 11101 BEOGRAD. Mezuro: Ronda, 30 mm.

La stampo verŝajne nur troviĝas sur utk kun la numero PTT 12/88. La utk montras Zamenhofan portreton kaj la tekston: 100 GODINA ESPERANTA kaj: JUGOSLAVIJA. Tiun stampon mi trovis sur utk-kopio sendita de H. Jankowski.

NE 19

73A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, ROTTERDAM, 23–30 JULI 1988 tekstas tiu stampo, kun mezuro de 34 mm.

Al mi ŝajnas, ke ĝi aperas nur lige kun normala datstampo kun la dato de 23.VII.88–9 de ROTTERDAM DE DOELEN (kun ciferoj 1 kaj 2).

Por la UK aperis memoriga koverto, kiu montras la bildon de la kongresa glumarko. La stampon kaj la koverton iniciatis nia kluba amiko Dick Goslinga.

Dankon mi direktas al Anni Wester, Dick Goslinga, Ivar Paulsson kaj Oene Hoekstra, kiuj sendis tiujn stampojn al mi.

MEK 4

Jen memoriga stampo el la municipo COYOACAN de Meksikurbo por la jubilea jaro de E. La dato en ĝi: 15 de Dic. 1987. En la stampo E-stelo, nia jubilea simbolo kaj la vorto MEXIKO. Krome ni legas: 1-er CENTENARIO INTERNACIONAL del 1-er LIBRO de TEXTO de ESPERANTO.

MEK 5

Okaze de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO en la poŝtejo "Mexiko d.f." funkciis 22–28.02.88 poŝta E-stampo. En la stampo bildo pri E-glm: du vizaĝoj. Tiun stampon mi posedas en helnigra (poŝte sendita) kaj en karbonigra (poste stampita-sen adreso).

MEK 6

INTERNACIA TAGO DE VIRINO estas la E-teksto en hispanlingva meksika stampo el MEXIKO D.F., kiu montras aztekan virinan kapon. La dato en ĝi: 8.III.88. Dankon al nia kluba amiko Angel Segura Peralta, kiu sendis la informojn pri MEK 4, 5 kaj 6.

Nekatalogitaj stampoj bulgaraj

Informoj pri bulgaraj stampoj ĉiam estis tre maloftaj, kvankam en nia ELF-AREK ne mankis kolektantoj en tiu lando. Sed nun, dank'al nia membro Hlebarov, eblas fari relativan ordon en la vico de la bulgaraj stampoj. Nia amiko Hlebarov akiris la "Informlibron pri bulgaraj filatelaĵoj, 1879–1979", kaj trovis en ĝi notojn pri jenaj stampoj:

BU 1A: Januaro 1956, SOFIA GARE (stacidomo), maŝinvarbstampo, Teksto en la tp: LERNU/INTERNACIAN LINGVON/ESPERANTO, du tipoj. La teksto estas en bulgara lingvo!

BU 1B: 1957, stampo sen dato kaj sen urbonomo, (mi dubas pri ĝia poŝteco). En la ovala stampo teksto en E: 70 JAROJ DE ESPERANTO, 1887, 1957 (E-stelo) 1907–1957, 70 JAROJ DE BULGARA ESPERANTO ASOCIO

BU 1B: Julio 1958, SOFIA C, (kaj: Varna. Ne notita en tiu katalogo).
Teksto en E: VIZITU LA 33-AN/ESPERANTO-KONGRESON/EN VARNA 20–22.VII.1958. Du tipoj (verŝajne Sofia kaj Varna).

BU 7A: Julio 1976, Ruse C, maŝinvarbstampo en bulgara lingvo: 39 KONGRESO DE/BULGARA/ESPERANTO-ASOCIO/10–12.7.1976 – RUSE

... Dankon al nia kluba amiko Hlebarov pro la senditaj informoj! En estonta stampokatalogo ni faros ordon en la stamponumeroj. Kiu posedas tiujn stampojn? Bv. skribi al la redaktoro.

Pri BU 1
Tiu stampo ekzistas en helnigra, karbonigra, verda kaj ruĝa. Siatempe en Bulgario regis ĉe la poŝto nestabilaj cirkonstancoj kaj privataj filatelaj magazenoj preparis la filatelaĵojn.

Pri BU 2
Ekzistas lige kun nia BU 2 almenaŭ 5 diversaj nuligaj ds. Ili havas mezurojn de 24 (Sofia kaj Sofia F), 25 (Sofia F), 26 (Sofia) kaj 27 (Sofia) m m.

Pri BU 5
Hlebarov trovis 5-an variaĵon de tiu UTK: de SOFIA (29.6). La variaĵoj koncernas nur la nuligan ds, ne la E-stampon.

BU 19
De 13–18.5.1988 okazis en la bulgara urbo Veliko Tirnovo "Semajno de E-Kulturo". Iom malfrue la poŝtejo uzis maŝinvarbstampon kun la teksto ESPERANTO kaj en la bulgara: Cent jarojn organizita Esperanto-Movado, Veliko Tirnovo. La senfina ms konsistas el jenaj eroj: datstampo-tekstoparto-datstampo-ondoj. Mia ds posedas la daton 31.5.88. Dankon al samideanino Olga Cankova, kiu sendis al mi la stampon.

ĈIN 49 A
Nia Ĉin Kajĝi trovis anstataŭanton por la forstrekita 17: ovalan stampon el la urbo Xining, ĉefurbo de provinco Qinghai. En la mezo E-stelo sur kontinentoj. Sube la dato 1987.7.26. Supre en la ĉina la teksto 100 jaroj de Esperanto.

ĈIN 59
Fine de marto 1988 okazis en Pekino la 7-a Tutlanda Popola Kongreso de Ĉina Popola Respubliko. Dum la inaŭgura tago, je la 25a de marto, la Changsha-a Poŝtmarka Kompanio, uzis esperantlingvan memorigan poŝtan stampon kun la teksto: "LA 7-A POPOLA KONGRESO DE ĈINIO".

ĈIN 60
Por la sama evento la Changshu-a Poŝta Telekomunika Oficejo ankaŭ uzis, je la sama tago, memorigan poŝtan stampon kun la teksto en Esperanto: "LA 7-A KONGRESO DE NACIA POPOLO DE PRĈ".

Lige kun tiu kongreso aperis la 25an de marto 1988 memoriga pm kun valoro de 8 fenoj kaj s-ano Zhang Linrui aperigis (privatan) UTK-on, kiu montras la enirejon de la Popola Halo en Pekino kun E-teksto pri la kongreso. Linrui ankaŭ estas desegninto de la stampo. Dankon al li pro la alsendo de tiu UTK kaj al amiko Kajĝi, kiu informis pri tiuj du novaj stampoj.

ĈIN 61
En la dua de julio 1988 aperis en Ĉinio pm-bloko okaze de la 110-a datreveno de emisio de unua serio de ĉinaj pm "Granda Drako". S-ano Linrui iniciatis ĉe la Changsha-a Poŝtmarka Kompanio poŝtan memorigan stampon, kiu posedas la E-tekston:

110 JAROJ DE UNUAJ ĈINAJ PM. En la mezo de la stampo bildo pri drako, Zhang Linrui aperigis memorigan koverton. La stampo, kompreneble, portas la daton 1988.7.2. (2a de julio).

ĈIN 62
Lige kun la apero de tiu jubilea pm-bloko aperis memoriga poŝta E-stampo ankaŭ en la urbo Changshu. La E-lingva teksto en ĝi estas iom alia:

110 JAROJ DE UNUAJ GRANDAJ ĈINAJ PM KUN DRAKO. La aspekto samas kiel n-ro 61. Tiun stampon sendis al mi Zhang Linrui pere de Ĉin Kajĝi, kiu kunsendis ankaŭ tiujn ĉi informojn. Dankon al li!

Mi konstatas, ke jam tri drako-stampojn ni nun posedas en nia kolekto. Bone kaj ĝuste, ke niaj ĉinaj amikoj uzis por tiuj stampoj la drakjaran pk kaj drakjaran pm.

ĈIN 14 kaj 23

Chengdu estas la ĉefurbo de la provinco Sichuan, ne Jiangsu. Por 23 ne aperis utk sed unuataga pk. En mia manuskripto mi iom fuŝis.

ĈIN 17 nepoŝta

Nur nun nia kluba amiko Ĉin Kajĝi malkovris, ke tiu ĉi stampo estas private farita. Do, bonvolu forstreki tiun pozicion el la ĉina vico. Forigu ankaú ĝian bildon el la bildparto! Sendube ne estis la lasta korekto en tiu vico.

PRI ĈIN 33

Nia Kajĝi informis, ke la dato en la tri stampoj estas notita per ĉinaj ideogramoj en la maldekstra rondo de la stampo. Por la tagdato ekz. estas tri signoj laú la vico: 2 10 6 (= 26).

HU 106

La Mondpaca Esperantista Movado kunvenis fine de aprilo 1988 en BUDAPEST. Multaj niaj klubaj geamikoj estis tie kaj sendis al mi salutkartojn kun memoriga stampo kiu tekstas:

11-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperanta Movado. La dato kaj loko en la rektangula stampo: Budapest, 1988.IV.30.

Mi dankas al: Fekete, Zöld, Lech, Radnai, Papeimer k.m.a.

HU 107

Stefano Fekete el Budapeŝto sendis al mi salutkarton el Kiŝkunhalaŝ kun nova stampo. Tiu tekstas:

"24-a LANDA AMIKA FERVOJISTA RENKONTIĜO" kaj posedas la daton 1988.07.02. La bildo en ĝi montras la fervojistan flugilradon kaj E-stelon. Dankon al nia Fekete pro la informo.

Nepoŝta hungara stampo

Lastatempe aperis en niaj vicoj privataj faritaĵoj. Tiuj estas stampitaj per privata stampilo kun la teksto "ESPERANTO EKSPOZICIO OROSHAZA 1957". Temas nepre pri nepoŝta, privata stampo, eĉ se ĝi troviĝas sur pk kun pm!

Pri AF 15

Goslinga sendis al mi AF 15 kaj mi konstatis, ke temas pri variaĵo: la maldekstra tp notas GIRO 5850 ZEIST anstataú GIRO 5850 UTRECHT.

Forgesita franca P.P.-stampo

Nia kluba amiko Jean Amouroux en n-ro 17 de FENIKSO informis pri la stampo FRA 37, ke ĝi ekzistas ankaú kun P.P.-ds. Okazis, ke tiu informo ne trovis eĥon en niaj poste aperintaj sta-katalogoj! Estis nia Richard Hirsch, kiu trovis tiun stampon kaj tuj sendis bonegan kopion al mi. 17 jarojn post ĝia apero! Do, mi ĝin envicigas en nian hodiaúan suplementon.

FRA 53

Maŝinvarbstampo kun la tekstoparto: ESPERANTO/CONGRES SAT-AMIKARO/ ALBI 2 AU 5.4.1988. Tiu ms ekzistas lige kun du div. ds: de ALBI C.T. TARN kaj de ALBI C.T. P.P. (Port Paye-Tarifo pagita). Dankon al nia kluba amiko Amouroux, Legris kaj Basso.

FRA 54
La urban blazonon de Perpignan prezentas al ni memorstampo por la 40a IFEF-kongreso. Tiu okazis 4–11.06.88 kaj partoprenis en ĝi kelkaj niaj klubaj geamikoj: Anton Straif, Mikaelo Legris kaj kompreneble Jean Amouroux, kiu loĝis en tiu urbo. Dankon al niaj klubaj amikoj, kiuj, kiuj sendis la belajn salutkartojn. La poŝto stampis nur dum unu tago: 7an de junio 1988.

GDR 36
"Arta Semajno '88" okazis de 8–15.5.1988 en Halle, GDR. Temas pri junulara E-aranĝo. En la poŝtejo 4020 Halle 2 estis havebla memoriga stampo kun la supre nomita nomo kaj bildo pri la kongresejo (junulara domo). La stampo antaŭe ne estis anoncita de la poŝto. Miaj stampoj posedas la daton 8.5.88–8.

GFR 32 A
Trovis ĝin kaj informis nia Amouroux. Temas pri trilingva ov stampo el Aachen 1 okaze de la "25-Jar-Solenaĵo IPA Aachen" (notite en la germana). Centre la anglalingva blazono de la IPA kun ĝia E-lingva slogano SERVO PER AMIKECO. Sube la dato: 11.-5.1984.

ITA 44
Germano Gimelli sendis al mi tiun stampon kun portreto de Zamenhof, E-stelo kaj kun la itala teksto: 75 ANNIV. FOND. GRUPPO ESPERANTISTA PADOVANO. Poŝtoficejo: PADOVA C.P. kaj la dato: 17.1.1988. Dankon pro la informo!

Nepoŝtaj ĉinaj stampoj

Okangula	1986.7.26	"71 ESPERANTO
Changji	1987.7.26	Terglobo kun E-stelo (Fondiĝo E-klubo)
Changsa	1987	Changsha-a E-Asocio
Jiangmen	1987.7.26	Fondkunveno Jiangmena E-Ligo
Chengdu	1987.11.12	E-ekspozicio Sichuan

Ekzistas pliaj poŝtstampsimilaĵoj ĉinaj, faritaj de esperantistoj. Se vi posedas ĉinan stampon ne listigitan en LVL 1/88, bv sendi kopion al la redaktoro por esplori ĝin.

Bilanco de la banko
por 1987 atingis min kaj Paulsson. En la banko troviĝis 31.12.87 4034 stampoj, 654 pk k tutaĵoj, 33 tutaĵkatalogoj (mi ne vidis tiujn) 9 stampo katalogoj kaj kelkaj E-pm.

Dankon al Werner Heimlich pro la farita laboro, kiu helpis al multaj akiri E-filatelaĵojn.

Nova oferto de la stampobanko
Werner Heimlich dissendis tiun oferton sufiĉe ampleksan. Vi trovas en ĝi amason da aĉeteblaj stampoj, tutaĵoj kaj eĉ glumarkoj. Ankaŭ Poŝtmarkoj kaj katalogoj estas haveblaj. Kompreneble ne ĉio estas havebla en la banko. Nur tio, kion sendis niaj membroj.

Hungara stampokatalogo
pli korekto: bildparto pri hungaraj E-filatelaĵoj. Faris ĝin nia kluba amiko Vilmos Radnai. En ĝi bildoj pri ĉiuj hungaraj stampoj, pm kaj utk, kaj poŝtkartoj. Mankas en ĝi la bildpoŝtkartoj. La bildparto bone kompletigas la stampokatalogon de ELF/AREK. Estus dezirinde, ke ankaŭ por aliaj landoj ekzistu tiaj bildpartoj. Antaŭ dek aŭ eĉ pli da jaroj ni jam eldonis kompletan pri ĉiuj E-stampoj bildparton, sed tiu jam ne estas aktuala. Bonvolu atenti la anoncon pri ĝi en nia LVL 74.

Niaj tutaĵoj

Pollando

Richard Hirsch sendis kopion pri pk kun surpreso pri la ICEM-renkonto 1987 en Poznan. La desegnaĵo montras E-stelon kun nia jubilea simbolo kaj tekston pri la jubileo.

Nia Rutkowski sciigis pri poŝtkartoj kun surpresoj pri la OLIMPIADA SZACHOWA ESPERANTYSTOW, SIEDLCE, 15.07.1987. La kompleta serio konsistas el 6 pecoj (po du kun pm pri floroj, Kochanowskiego kaj Glowy Wawelskie – verdaj kaj brunaj surpresoj).

Lige kun la Bialistoka Tago en la kadro de la 72a UK aperis en Bialistoko kun la cenzura numero: BZGr 770/87, W-6 du surpresitaj poŝtkartoj:
– kun faksimilo de la libro MARTA
– kun portreto pri Zamenhof
Eldonkvanto: 1 500 pecoj.

GDR 53 kaj 54

Hazarde mi ilin trovis en la teko de GDR-Esperantisto dum IFER 88. Ili havas eldonkvanton de po 300 pecoj . . . kaj estas eldonitaj en oktobro 1987.

N-ro 53 montras laúrbraĉon kun la teksto: ESPERANTO 1887–1987 kaj nro 54 emblemon pri HER (Harcmontara E-Renkonto) en Quedlinburg, 9–11.10.1987. Duoblaĵojn mi ne trovis.

GDR 55-1/2

Aperis okaze de la TAGO DE LA E LIBRO 1987 en decembro 1987. La surpreso montras reproduktaĵon de la unua E-lernolibro por germanoj.

GDR 56-1/2

Aperis okaze de IFER 88 kun desegnaĵo kaj teksto HOMO KAJ SCIENCTEKNIKA REVOLUCIO (11–13.3.88 en Leipzig). Multaj el vi ĝin ricevis de mi lige kun ĝia poŝtstampo.

GDR 57

Aperis okaze de la ARTA SEMAJNO HALLE '88 kun ronda surpresaĵo. (Delfeno kun E-stelo) Mi antaúe ne sciis pri ĝi apero.

10 tutaĵoj el Veliko Tirnovo

La bulgara E-historiistino Olga Cankova malkovris, ke ekde 1888 en Veliko Tirnovo ekzistas organizita E-movado. Dum UEA-seminario en Bad Saarow ŝi prezentis prelegon pri la historio de BEA kaj tie mi feliĉe konatiĝis kun ŝi. Kvankam ŝi ne estas filatelistino, ŝi memoris pri mia E-filatela hobio kaj sendis vicon da novaj tutaĵoj. Tiujn mendis la Distrikta Estraro V.T. de BEA. Aperis entute 3000 pecoj. La desegnaĵojn faris la grafikisto Marko Karaĉov. Ili ĉiuj ne plu estas haveblaj. Mi ricevis la jenajn:

– mk, 5 stotinkoj (verda)
  sp: ESPERANTISTA SOCIETO LUMO/VELIKO TARNOVO, eldonkvanto: ĉirkaú 1000 pecoj
– pk, 5 stot. (verda)
  sp: kiel sur la mk
– mk, 5 stot. (verda)
  sp: 100 JAROJN ESPERANTO EN VELIKO TARNOVO 1888–1988
– pk, 5 stot. (verda)
  sp: kiel sur antaúa mk
– mk, 5 stotinkoj (verda)
  sp: kiel sur la antaúa mk, sed en la bulgara
– pk, 5 stot. (verda)
  sp: kiel sur la antaúa mk, sed en la bulgara

- ilustrita mk, 5 stot. (blua), bildo: fervoja tunelo
  sp: SEMAJNO DE ESPERANTO KULTURO EN VELIKO TARNOVO,
  13–18 MAJO 1988
- il. mk, 5 stot. (blua), bildo: fervoja tunelo
  sp: kiel sur la antaúa mk, sed en la bulgara
- il. mk, 5 stot. (blua) bildo: pinta monumento
  sp: kiel sur la antaúa mk, en Esperanto
- il. mk, 5 stot. (blua), bildo: pinta monumento
  sp: kiel sur la anataú mk, en la bulgara

Dankon al sinjorino Olga Cankova, kiu sendis ilin al mi.

Jubilea tutajo el Bulgario

- mk, 5 stot. (verda
  sp: 100 JAROJ ESPERANTO kaj portreto de Zamenhof
  Grafikisto: Damjan Nikolov
  Eldonkvanto: Serio A: 3849 (malhelverda sp) Eldonis: poŝtministerio
  Serio B: 20000 (helverda sp) = laú mendo de BEA

Dankon al niaj klubaj geamikoj Hlebarov kaj Litov pro la informoj!

Klarigoj: mk = markokoverto, sp: surpreso

Famaj personoj lige kun Esperanto

Penjo Penev (1930–1959)

Elstara bulgara poeto. En la Nacia Muzeo de Bulgara Literaturo troviĝas taglibro de Penev, skribita Esperante kaj bulgare! Krome konatiĝis de li poemo en Esperanto: HOMO. Pri tio informas la bulgarlingva "Esperanto Informilo" 2/87 de BEA. Pri Penev ekzistas 5-stotinka pm el la jaro 1980 kaj utk. Kiril Hlebarov, "Goce Delĉev" 8, BG-2850 Petriĉ volonte sendas ĝin al vi interŝanĝe kontraú vialandaj stampoj.

Bruno Migliorini (1896–1975)

Li estis prezidanto de la Accademia Italiana della Crusca, la plej alta instanco por la itala lingvo. Li estis Esperantisto. Pri la akademio aperis 1984 en Italio poŝtmarko. Dankon al Pignatelli, kun jam 16.2.1987 pri tio skribis al mi.

Monda Konferenco pri Turismo

ne estas fama persono, sed aprobis rezolucion favoran al Esperanto. Jam dufoje! En San Marino aperis 1982 poŝtmarko pri la konferenco. Informis nia Pignatelli pri tio jam pasintjare. Dankon al li!

Radio Pekino en Esperanto

11-an de septembro 1987 la ĉina poŝto aperigis memorigan markokoverton kun surpresita pm 8-fena okaze de la 40-a naskiĝdatreveno de Radio Pekino. Jam delonge ĝi emisias ĉiutage programojn en E. La ĉefredaktoro Nan You Li, pasia E-filatelisto, partoprenis nian kunsidon en la 72a UK. La tutaĵo estas belega filatelaĵo!

Fernando Ortiz Fernandez (1881–1969)

Li estis prezidanto de la "Kuba Societo por disvastigo de Esperanto", fondita 1910 en Havano. En Kubo Ortiz estas nomata "Tria Eltrovinto de Kubo" pro liaj esploroj sur la kampo de sociaj sciencoj. Speciale li okupiĝis pri la kuba afrikdevena folkloro.

La 20an de decembro 1981 aperis en Kubo kvarmarka serio okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de "Don Fernando". La 3-centava pm portras portreton pri li.

Dankon pro senditaj informoj al nia amiko Figueredo, kies skribaĵon pri Don Fernando mi ege mallongigis pro la limigita spaco en nia informilo.

Fidel Castro Ruz

La unua Esperanto-libro el Kubo titoliĝas "La historio absolvos nin". Temas pri esperantigita parolado de Castro, kiun li faris dum la procezo pro la atako al la kazerno Moncada (1953). La libro aperis 1984.

Poŝtmarkoj pri la libro: Yvert 731 kaj Av. 244/50
Poŝtmarkoj pri Fidel Castro: Multaj en Kubo, Ĉinio, Nikarakvo k.a.
Dankon pro la informoj al amiko Figueredo, kiu jam antaû pli ol jaro sendis tiujn, kaj aliajn, informojn.

José Americo de Almeida

Fama brazila verkisto, naskita 1887. Lia verko "O Bagaceiro", esperanten tradukita de Geraldo Mattos nomiĝas "La Bagacejo".

23.10.1987 aperis en Brazilo memoriga poŝtmarko pri Almeida kaj pri tiu libro.
Dankon al Gert Drucker pro la informoj.

Aliaj pri E-filatelo

El Popola Cinio 8/87

Artikolo pri artikolo en la ĉina gazeto "FILATELO DE GJANGSU", kiu priskribas la E-filatelan agadon de nia SONG SHENGTAN.

El Popola Cinio 1/88, 2/88

Artikolo pri ELF-AREK, tripaĝa, kaj en la februara numero pri la "Filatela Sekcio sub la Pekina Esperanto Asocio".

La Mondo 11/87

Riĉe ilustrita tripaĝa artikolo pri ELF-AREK kaj pri ĉinaj jubileaj E-filatelaĵoj. Posedas ankaú en la ĉina unuan liston pri tiuj filatelaĵoj.

Radio Pekino

Elsendis intervjuon de la radio-ĵurnalisto (kaj E-filatelisto) s-ro Nan, kiun li faris en la E-filatela ekspozicio de la 72a UK. (Parolis pri la E-filatelo Burmeister, kaj pri la ekspozicio la UEA-vicprezidanto Maertens).

Radio Polonia

S-ino Barbara Pietrzak, redaktorino de la Esperanto-redakcio, faris 7-minutan intervjuon pri ELF-AREK kaj la E-ekspozicio en la 72a UK kun R. Burmeister. Intervjuon prenis ankaú la redaktoro de la germanlingva fako.
Krome Radio Polonia ofte elsendas informojn pri E-filatelio.

Internacia Novaĵ-agentejo

Disvastigis tra la mondon informon pri la E-filatela ekspozicio en la 72a UK, kiu aperis en multaj radiostacioj kaj gazetoj.

Gazeta Pomorska

N-ro 161/1987 enhavas artikolon pri nia kluba amiko Roman Rutkowski kaj lia filatela hobio.

La Philatelie Francaise

Regule enhavas rubrikon pri E-filatelo el la plumo de nia kluba amiko Amouroux. Kun multaj ilustraĵoj. 1987 aperis 5 grandaj artikoloj.

Sammlerdienst 9/87

En tiu federacigermana filatela populara gazeto aperis 6-paĝa artikolo pri "100 jaroj de Esperanto" kaj pri ĝia filatelio. Verkis ĝin s-ro Jan Billion. Multaj fotoj akompanas ĝin.

Filatelia cubana 1/87

Ilustritaj artikoloj pri la solenaĵo en Sagua La Grande kun ĝia stampo kaj pri la unua kuba E-poŝtmarko.

Boletin "La Damajagua" sept. 87

Hector Juarez Figueredo, nia kuba kluba amiko, verkis por ĝi dupaĝan artikolon pri la E-filatelo. Jam pli frue min atingis tiu bulteno kun alia artikolo pri E-filatelo.

Juventud Rebelde

En la gazeto de 23a de aprilo 1987 troviĝas artikolo pri la unua kuba E-poŝtmarko. Temas pri gazeto por la kuba junularo.

adelante

Ankaŭ tiu ĉi kuba gazeto enhavas artikolon pri Esperanto kaj ĝia filatelo. Verkis ĝin nia kluba amiko Hector Juarez Figueredo. (26a de aprilo 1987)

Korean Stamp Review

Sinjoro SO Gilsu el Suda Koreo sendis al mi tiun belegan luksan multkoloran filatelan revuon n-ro 4/87. En ĝi tripaĝa artikolo sub la titolo: "The Centenary of ESPERANTO, the Language for Peace". La artikolon verkis profesoro d-ro Cha-Shik Sin de la Dankook Universitato. Akompanas ĝin koloraj fotoj pri jubileaj E-pm kaj granda foto pri la inaŭguro de la 72a UK.

Cent aliaj gazetoj

aŭ pli en multaj landoj dum la jaro 1987 enhavis artikolojn pri la E-filatelio lige kun la apero de niaj jubileaj E-filatelaĵoj. Ne eblas, ĉi-loke citi ĉiujn.













Novaj glumarkoj

100 jaroj de Esperanto-Saluton el la kongresurbo Varsovio, kaj: 72a UK de E en Varsovio. Cervello-eldono, desegnis Radnai. Du glumarkoj po tri en folio. 7 kolor-variaĵoj. Junio 1987.

23-a Kataluna Kongreso, Barcelona, 1987
Ses serioj kun po 4 malsamaj glm sur unu folio. Por ĉiu serio 9 kolorvariaĵoj. Serio A1 – A6. Aperis junio-septembro 1988. Eldonis: Cervello.

Vizitu SriLankon
6 div. glm en unu folio. 10 kolorvariaĵoj. Sept. 1988. Cervello-eldono.

E en Nagykanisza, 1905–1987

Centenario Esperanto, itala eldono sur memglua papero.

56a IKBE-kongreso, porblindulaj glm kun palpeblaj signoj.

61a SAT-Kongreso, memgluaj glm.

43a SAT-Amikara Kongreso, en Albi Francio

IFER 88, memgluaj, 3 kolor-variaĵoj, Leipzig

E-Klubo Brno salutas IFER 88, rondaj glm el CS.

73a UK, memgluaj, el Rotterdam.

24a Landa Fervojista Renkonto, Hungario.

SEF-Kongreso 1988, bildo: birda kuniklo.

E-redakcio en Pola Radio, memglua, jubilea simbolo.

Saksa Kuriero, memglua.

E-Klubo Leipzig, memglua.

UNICEF, Helpu al la infanoj, Leipzig.

100 Jahre Esperanto, memglua, Bad Hersfeld.

GEA-kalendareto 88, memglua.


Nagykanisza 1988, supra kirko.

40a IFEF-Kongreso, memglua.

19a Pacrenkonto, Debrecen, 1987, ronda glm.

20a Pacrenkonto, Szeged, 1988, ronda glm.

Koran dankon pro senditaj informoj pri glm al: Cervello, Szabadi, Radnai, Jankowski, Dörfler, Lindström, Goslinga, Legris, Amouroux, Beau, Hirsch, Almaŝi.








NÜRNBERG 1
1888-1988
22.10.1988
CENTJARA JUBILEO
8500
ESPERANTO-GRUPO NÜRNBERG


DIA INTERNACIONAL DE LA MUJER
CANCELACION ESPECIAL
INTERNACIA TAGO DE VIRINO
MEXICO D.F.
SERVICIO POSTAL MEXICANO


75 ÉVES A MISKOLCI ESZPERANTÓ MOZGALOM
1913
1988
MISKOLC,1988.VIII.19.


1887 CENTENAIRE DE L'ESPERANTO 1987
amikeco trans limoj
7 NOVEMBRE 1987
57 MONTIGNY LES METZ


PARA
RUSIA
POLONIA
FRANCIA
ALEMANIA
ЯЗЫКЪ.
15 de DIC.1887a1987·MEX.
Cancelación Especial.
SERVICIO POSTAL MEXICANO


Praga '88
SVETOVA VÝSTAVA POŠTOVÝCH ZNÁMOK
TUTMONDA EKSPOZICIO DE POŜTMARKOJ

Mi amas ESPERANTO'n



INTERNACIA
FOIRA
ESPERANTISTA
RENKONTO

LEIPZIG
11.-13.3.88











CENT JAROJ DE ESPERANTO







11a Ĝenerala
Konferenco
de Mondpaca
Esperanta
Movado
Budapest, 1988.IV.30.

















VASTENAKTIE
SAMEN BOUWEN

GIRO: 5850 ZEIST

ZEIST
18.VIII.82
Zamenhofln. 17
3706 VA

NEDERLAND
*000
CENT
FR 15883